# *Díaz-Canel vizitas la provincon Guantánamo*



Havano, 29 nov (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel, plenumas laborviziton en la orienta provinco Guantánamo, kie  li pritaksas kaj impulsas la ?efajn programojn sociekonomiajn de la teritorio.

Díaz-Canel vizitis diversajn centrojn sociajn kaj ekonomiajn kaj dialogis kun la gvidantoj kaj laboristoj en la koncernaj centroj. Li vizitis la provincan hospitalon ?eneralan doktoro Agostinho Neto, la plej granda en la teritorio.

Tie li dialogis kun la kuracistoj, flegistinoj kaj pacientoj; lin akompanis Rafael Pérez Fernández, membro de la centra komitato kaj unua sekretario de la komunista partio de la provinco;  Nancy Acosta Hernández, prezidantino de la provinca asembleo de la popola povo kaj Fernando Navarro Martínes, vicministro pri publika sano.

La prezidento vizitis diversajn halojn en la hospitalo kaj esprimis ke la celo de la vizito estas helpi por plibonigi tiujn servojn kies rezultoj ankora? ne estas la dezirataj.

La laborvizito de la prezidento komenci?is tra la distrikto Baracoa, en la orienta ekstremo de la lando, kie li anka? renkonti?is kun a?toritatuloj kaj entreprenistoj de la fabriko de ?okolado pri la investo tie plenumata, interalie.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/177778-diaz-canel-vizitas-la-provincon-guantanamo

**Radio Habana Cuba**